



Eventoj

Redakcia adreso:
Budapest, pk. 87.
H-1675, Hungario
Telefono kaj telefakso:
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

aprilo (2) - '92

Kie loĝi en Vieno dum la UK?

Amasloĝejo havebla, ve nur ĝis 30!

Ejo: paroĥa domo, 30 minutojn de la kongresejo per publika transporto. disponeblas krom la dormejo (supozeble granda halo) kuirejo, amuziĝejo, duŝo kun malvarma akvo. Ĉu dormsako estas bezonata, ne estas konate. Ankaŭ ne, ĉu estos matracoj aŭ nur la planko.

Kondiĉoj por aliĝo: aĝlimo ĝis 30 jaroj, kaj aliĝo al la UK. Por nealiĝintoj estas punpago de 500 ATS (ĉ. 80 NLG).

Ĉar nur nun estas konata la eblo loĝi amasloĝeje, (por multaj la sola pagebla kategorio), la nunaj aliĝ-kategorioj por UK estas:

Por IM (Individua Membro de UEA) 270/135 NLG,
por ne IM-oj 315/158 NLG,
por kunulo, mem IM 180/90,
por kunulo, mem ne IM 225/112 NLG.

(La prezoj ankaŭ varias laŭ aliĝlando A/B, listigita sur la aliĝilo de UK).

Mem la amasloĝejo-kotizo ĝis 30.06.92 estas 250/150 ATS, poste 300/200 ATS

pagenda al poŝtĉekkonto: Postscheckamt Wien, Kto-Nr. 7497.427. La skriban aliĝon sendu al Aŭstria Esperanto-Junularo, Pf. 804, A-8011 Graz, Aŭstrio.

UEA ankaŭ peras tranoktejojn en hoteloj en naŭ kategorioj inter 36-395 NLG/po tago, variaj laŭ hotelspeco. Krome aldonendas 150 NLG por administraj kostoj.

Por la cetera kategorio de amasloĝejo-dezirantoj (pli ol 30-jaruloj aŭ/kaj la UK-aliĝkotizo estus montata salajro, aŭ eĉ pli) la afero ankoraŭ ne estas solvita. Por ili estas konsolo, ke la UK-aliĝkotizo ne plu altiĝas(?). Eventualaj aliaj proponoj por tranoktejo estas atendataj por publikigo.

Kompakta disko de Tutmonda Muziko ĵus aperinta - granda sukceso

Nova popmuziko en esperanto

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis la kasedo "Esperanto" de la grupo Tutmonda Muziko. Jen mi volas iom priskribi la ideon kaj la ĝisnunajn rezultojn de la projekto.

La ideo de Gunter Koch ŝajnis unue certe iom strange al ne malmultaj homoj, kelkaj eble eĉ timis fiaskon. "Mi volis krei profesi-nivelan popmuzikon en esperanto" - li klarigas, "precipe por tiel plibonigi la prestiĝon de esperanto kaj por akceli la publikrilatan laboron. La muziko estas aŭskultinda ankaŭ por neesperantistoj, kaj pere de Tutmonda Muziko multaj homoj aŭdu pri la internacia lingvo".

Intertempe la projekto prosperas; aperis la kasedo kaj kompakta disko "Esperanto" kun dek unu muzikaĵoj, agrable aŭskulteblaj kantoj kun moderna muziko. Pozitive surpriza estas la vere bonega kvalito de la kasedo kaj kompaktdisko. La registraĵo atingis nivelon, kiu en Esperantujo ankoraŭ estas nekutima kaj sendube estas komparebla al profesiaj varoj.

Laŭdirde estas ankaŭ, ke la kompaktdiskon

akompanas kompleta teksto-kajereto.

Do, entute oni devas nomi la rezulton de la iniciatemo de Gunter Koch tre konvinka kaj sukcespromesa.

Sed finproduktinte la kasedon, la teamo Tutmonda Muziko ankoraŭ ne ĉesigis sian laboron. Nun gravis prezenti la kasedon al la publiko. Ĉirkaŭ kvarcent ekzempleroj estis dissenditaj al radiostacioj en tuta Germanio. Tutmonda Muziko prezentigis en pluraj radioelsendoj, kaj eĉ sukcesis eniri la televidan programon. "Multon Tutmonda Muziko jam atingis, kaj nun estas grave, teni la fajron brulanta, nome zorgi, ke la esperantlingva muziko fariĝu pli kaj pli konata. Se post kelkaj monatoj la kantaĵoj estos konataj jam nur en la esperanto-movado, la ega peno estintus senvalora" - diras Gunter Koch. Tial li esperas kaj petas ke laŭeble ĉiu klopodu plue diskonigi la projekton, ekz. dezirante la kanton "Esperanto" ĉe la loka radiostacio. Por varbi, intervui, gratuli ktp. la grupon Tutmonda Muziko, bv. kontakti Gunther Koch, Hohbergerstrasse 7, DW-7037 Magstadt, Germanio.

*ug

kun la subaj bildoj laŭ GEJ-gazeto 2/92

Senluziigoj kaj esperoj

Post longa daŭro, jen finfine aperis Rokgazet' n-ro 3, varie ilustrita, divers-enhava, 28-paĝa porokaza revuo. Bedaŭrinde iom tro multe ĝi kostas (20 USD por kvar n-roj), precipe por netranspagipovaj landoj, kien ekde nun ĝi ne plu estos sendata senpage. Lingve bona, nur la komo estas apenaŭ konata por la redaktoroj. Estas interesaj la pensvekaj frazoj de la redaktoro:

Rokgazet ne havas precizajn aperdatojn, kaj tio okazas pro diversaj kialoj:

- Materialo, kiu venas nek regule, nek akurate,
- Novaĵoj, kiujn indas aperigi lastmomente,
- Solvoj por netranspagipovaj landoj ankorau ne trovitaj (ĝis nun ni sendis al ili senpage).
- Financaj problemoj pro manko de abonantoj, ktp...

La esperantistaro senluziigis nin pro ĝia apatio kaj malfidemo.



Rimarkindas, ke ekzistas malmultaj revuoj por la esperanto-junularo, kaj mi miras, ke eĉ por tiel malmultnobraj ili ne havas pli da subteno.

Eble la esperanto-movado atendas, ke ili malaperu por diri: "Ho jes, ili estintus subtenindaj; sed tro malfrue". Ofte kaj preskaŭ ĉiam oni tro malfruas pri tiuj aferoj.

Mi ne diras tion nur, ĉar ni eldonas Rokgazeton, sed ĉar la esperanto-junularo bezonas revuojn por si mem en kiu ĝi trovas interesaĵojn, kiuj utilas ankaŭ por pliinteresiĝi novajn junajn esperanto-lernantojn, kaj tiel vi jam certe scias, tro da mono ĉe gejunuloj malofitas.

Laŭ mi - kaj kalkulo - esperanto-revuo estas tiom malmultaj, ke ili estas subtenindaj, kvankam (daŭrigo sur p. 6.)



Teorio

Rilatoj kun la gazeto konsilioj

Prelego dum UEA-seminario pri informado en Poprad, 1992

Antaŭrimarko: Ĉi tiuj konsilioj ĉefe validas por la plej oftaj okazoj de kontaktoj de esperantistoj kun ĵurnalistoj, nome sur loka (urba, regiona) nivelo. Kun modifoj tamen ili estas aplikeblaj ankaŭ por aliaj niveloj (ekz. faka, tutlanda gazeto, inform-agentejo, k.s.).

1. Mankas intereso pri esperanto.

Konsciu, ke ĵurnalistoj same kiel la ĝenerala publiko scias preskaŭ nenion kaj ankaŭ ne havas intereson pri esperanto. En multaj, precipe okcidentaj landoj oni pensas, ke la lingvo-problemo estas solvita per la disvastigo de l' angla lingvo. Ĵurnalistoj kutime scias ĉi tiun lingvon kaj aplikas (devas uzi) ĝin en sia profesio. Krome konsciu, ke helpe de gazetoj vi ne povas konvinki homojn pri la valoroj de esperanto: el ĉiuj studoj pri akceptemo de la legantoj oni scias, ke ili akceptas argumentojn, nur se ili konfirmas iliajn jamajn konvinkojn, opiniojn, sintenojn, ktp.

2. La limigita celo de informado helpe de gazetaro

El punkto 1. sekvas, ke per informado pri esperanto en gazetoj ni maksimume povas vekti la intereson de latentaj simpatiantoj. Tamen, laŭ la ĝenerala sperto, ties nombro estas sufiĉe granda. Do, valoras la penon, helpe de l' gazetaro ne nur vekti ilian intereson, sed ankaŭ viziteno ĝin, ĉar el simpatiantoj estiĝas foje adeptoj. Tial necesas konstanta informado pri esperanto kun tiu ĉi limigita celo.

3. Persona kontakto kun ĵurnalistoj

Por sukcesi ĉe redakcioj, estas grave havi personan kontakton al la respondeca redaktoro almaneŭ unu fojon. Do, vizitu la redakcion kaj prezentu vin al la ĵurnalistoj. Kunportu informan materialon (ne tro multan) kaj sobre klarigu, kio estas esperanto (se li tute ne scias); respondu trankvile liajn demandojn, eĉ se ili estas plej stultaj (en viaj oreloj). Informu pri via klubo kaj invitu lin al vizito, atentigu lin pri temoj taŭgaj por raporto aŭ intervjuo. Demandu pri teknikaj aferoj (al kiu sendi manuskriptojn, kiun alvoki telefone, ktp.).

4. Raportoj kaj manuskriptoj

Se temas pri grava programero en la vivo de via klubo, estas konsilinde verki koncizan antaŭ-raporton ĉ. unu semajnon antaŭe; precize indiku daton, lokon, temon, ktp., por ke potencialaj interesitoj povu alveni. Eventuale pensu ankaŭ pri pagata anonco.

La plej ofta formo de informado estas raportoj pri okazintaj eventoj. Gravus, ke vi ne atendu tro longe por verki manuskripton: faru tuj la saman aŭ postan tagon kaj tuj transdonu/sendu ĝin. Ne prete liveru tajpitan manuskripton laŭ ĵurnalismaj reguloj (vidu pri tio en *Manlibro pri ĵurnalismo*).

Se temas pri evento en la ĝenerala esperanto-movado ekster via urbo (ekz. UK), tio kutime ne interesas lokan ĵurnalon. tamen, se

FOR LA IDEALISMON

Mi serĉis instruantojn por esperanto-kurso. Mi demandis spertan kaj sukcesan instruanton kion li postulus. Por sia instrulaboro li petis nenion, nur la repagon de la vojaĝkostoj. Ŝajne plej bonaj kondiĉoj por organizanto de kursoj, ĉu ne?

Preskaŭ. Tiu amiko ŝatas instrui, sed li rifuzis nian oferton. Li diris ke li ne havas tempon. Li ne havas sufiĉan monon kaj serĉas laŭ-okazajn laborojn (ekster esperantujo). Lian sintenon mi kun bedaŭro konstatas jam de jardeko. Niaj plej kapablaj homoj – plenaj de E-idealismo – rifuzas labori kontraŭ mono en la esperanto-movado. Sed ĉar ili ne havas sufiĉan monon, ili devas labori aliloke kontraŭ mono, ŝofori taksion ekzemple. Kaj sekve ili ne plu havas multan tempon por labori en la esperanto-movado, kion ili ja ŝatas.

Mi certe ne pledas, ke ĉiu funkciotulo ricevu honorarion. Certe necesas amaso da honoraj oficoj. Sed ankaŭ ekzistas kelkaj laboroj, kiuj en nacia medio estus kutime pagataj. Instruado de lingvo kaj organizado de lingvokursoj ekzemple, gastigo de fremduloj, perado de vojaĝoj, eĉ organizado de vojaĝoj kaj renkontiĝoj kaj – kredo aŭ ne post viaj ĝeneralaj esperanto-komunumaj spertoj – por verkado de artikoloj, tradukado, interpretado.

Mi ankaŭ ne pledas por tio, ke ĉiam ĉiu instruanto aŭ tradukanto efektive ricevu honorarion. Sed mi petas, ke oni akceptu la principojn, ke laborantoj ankaŭ en la esperanto komunumo ricevu decan kaj kutiman honorarion aŭ salajron.

Eble tamen en praktiko kelkfoje la dunganta esperanto-organizo kaj la dungato konsentas pri nenia aŭ malalta honorario. Sed tiam oni komprenu, ke temas pri donaco de la kunlaboranto, eble oni eĉ montru ankaŭ

tiajn donacojn en la speskalkulo.

Jam komence mi skribis, ke bone pagataj laboroj eksterkomunumaj forlogas niajn spertulojn. La vivrealo estas kruda – la bakisto ne donas panon al vi senpage se vi honorofice laboras por esperanto. – Ĉu ni vere volas rezigni pri laborforto de homoj, pri la vivnivelo normala en ilia socio, “libera libertempo”, familio eble? La progreso de esperanto, la grandeco de la esperanto-komunumo dependas (inter alie) de la kvanto da laboro dediĉata al ĝi. Ni provu grandigi tiun laborkvanton.

Alia problemo estas la laborokvalito. De honoroficanto oni ne povas postuli perfektan laboron, perfektan preparadon de instruado ekzemple. Kaj ĉu la instruanto mem pagu sian abonon de pedagogia gazeto, la partoprenon en instruista seminario?

Oni povus argumenti, ke la esperanto-komunumo ne havas la monon por pagi siajn kunlaborantojn. Mi fakte ne volas ĉerpi el la ofte malplenaj kaso de esperanto-organizo. La uzanto de servo pagu ĝin, la esperantolernanto, la partoprenanto en renkontiĝo, la abonanto de revuo, la gasto en esperantlingva pansasio.

Ĉu vi timas, ke tiuj ne pretos pagi normalajn prezojn? Por altkvalita produkto la klientoj pretas pagi adekvatajn prezojn. Tion montras la spertoj ekster nia esperanto-komunumo kaj ankaŭ en kelkaj sukcesaj esperanto-entreprenoj. Kompreneble necesas profesinivelaj produktoj kaj surmerkato.

Eble ni mallernu envion. Sukcesaj, profitodonaj, grandigantaj esperanto-asocioj, pli helpas al la grandigo de la esperanto-komunumo ol deficitajfo.

Lu WUNSCH-ROLSHOVEN
Tietzenweg 55

D-W-1000 Berlin 45, Germanio
laŭ *Seminaria Gazeto, TEJO-PSEK*



RILATE INFORMADON NIAJ
MOVADANOJ AGAS PRAEPOKE

vi lerte enplektas lokan rilaton, tamen vi povas lanĉi raporton eĉ pri UK en la loka ĵurnalo.

5. Gazetar-konferenco, intervjuo

Tiuj ĉi metodoj por helpe de ĵurnaloj informi la publikon pri esperanto devas esti ligitaj al tute konkretaj, gravaj aferoj kaj eventoj. Aranĝi gazetar-konferencon valoras nur en granda urbo kun pluraj redakcioj gazetaj, radiofoniaj kaj televidaj. Inviti al intervjuo tamen eblas ankaŭ ĉe pli ordinaraj aferoj kaj

temoj; sed gravas, ke la intervjuato estu lerta homo, kiu ne falas en la kaptulojn de ĵurnalistoj.

Detalajn konsilojn proi verkado de manuskriptoj kaj kontaktoj kun ĵurnalistoj vi trovas en *Manlibro pri ĵurnalismo*.

Stefan Maul
Pferseerstr. 15, DW-8900 Augsburg, Germanio

Eblaj ekzercoj por labor-rondoj:

1. Vizito en redakcio de ĵurnalo por prezenti esperanton.

2. Antaŭraporto pri okazonta esperanto-ekspozicio.

3. Verkado de manuskripto pri evento en esperanto-klubo (ekzemple Zamenhof-festo, vizito de eksterlanda gasto, jarĉefkunveno kun estrar-elekto).

4. Raporto por loka ĵurnalo pri UK.

5. Redaktoro intervjuas esperantiston (ekz. filateliston, radioamatoron).

6. Vi prezidas gazetaran konferencon.

7. Vi volas persvadi telefone redaktoron de faka revuo, aperigi artikolon verkotan/verkitan de vi pri la utilo de esperanto en via fako.

Esperanto aplikata

Hotelo Esperanto en Ĉinio

En Qingdao Turisma Lernejo ekfunkciis hotelo Esperanto, kun esperanto-parolanta personaro. La hotelo estas kvaretaga kaj havas 112 litojn en 44 ĉambroj. Tie okazos la Pacifika Esperanto-Kongreso en 1992. Jam 150 lernantoj lernis kongreson kaj laboras en la nova hotelo kaj en aliaj urbaj hoteloj. Estas planata: - fariĝi Internacia Esperanto-Kursejo, - en esperanto organizi kursojn pri la ĉina kuirarto, kaligrafio, sindefendo kaj similaj.

Kontaktoj serĉataj

Komercajn kontaktojn peras kaj organizas instruadon de esperanto al oficistoj Esperanto-Grupo "Futur", Pk.120, BG-9700 Ŝumen, Bulgario.

Mezaĝa bulgara inĝeniero serĉas negockontaktojn kun entreprenema esperantisto el okcidenta Eŭropo aŭ Ameriko por reciproke utila produkta aŭ komerca kunagado. Nikola Uzunov, 3 Remsisti 18/B-10, BG-6300 Haskovo, Bulgario.

S-ro Milos Bultas estas ekonomo kiu instruas en alta lernejo en Ostrava. Li serĉas personojn (profesorojn, studentojn ...) kiuj per korespondado povas reciproke helpi objektivajn informojn kaj profesiajn spertojn. Adreso: ul. Karsarenska 1, CS-74601 Opava, Ĉeĥoslovakio.

(Laŭ La Merkato n-ro 35.)

INFORMOJ PRI LA TELEFONADO

Duĉiferaj telefonnumeroj:

Servservoj: 04 Ambulancoj (Urĝa Helpo); 05 Fajrobriĝado; 07 Polico

Postaj servoj: 01 Mendo de enlanda telefonado; 02 Telegramsendo per telefonado; 09 Mendo de interlanda telefonado

La ĝi-supraj servoj estas senpagaj.

SIGNALOJ EN HUNGARIO

Linco-signaloj: Linco-signaloj; Signaloj de sonorigo; Signaloj de okupiteco; Speciala informo-signaloj

TELEFONADO PER ABONITA APARATO

Maniero de la loka vokado: - levinte la aŭdilon atendu la linco-signalon - voku la telefonnumeron de la abonito

Linco-signaloj: Linco-signaloj de la abonito

Tarifoj de la loka telefonado: inter 07-18 h 5,- Ft/3 minutoj; inter 18-07 h 5,- Ft/6 minutoj

Maniero de la enlanda aŭtomata interurba telefonado: - levinte la aŭdilon atendu la linco-signalon - ciklu la numeron 06 de la enlanda trafiko - atendu la duan linco-signalon - ciklu sinsekve la regionan kodon kaj la lokan telefonnumeron

Linco-signaloj: 06; Linco-signaloj: Regiona kodo kaj loka telefonnumero

Tarifoj de la enlanda aŭtomata telefonado:

Tarifaj zonoj	inter 07-18 horoj	inter 18-07 horoj
I.	por 60 sekundoj	por 120 sekundoj
II.	por 20 sekundoj	por 40 sekundoj
III.	por 15 sekundoj	por 30 sekundoj

La listo de la aŭtomata vokotaj lokoj kaj ties regionaj kodoj vidi sur la paĝoj 16-20 de la telefonlibro.

Maniero de la interacia aŭtomata telefonado: - levinte la aŭdilon atendu la linco-signalon - ciklu la numeron 00 de la interacia trafiko - atendu la duan linco-signalon - voku sinsekve la landan, la regionan kodojn kaj la lokan telefonnumeron

Linco-signaloj: 00; Linco-signaloj: Lando kodo, regiona kodo, loka telefonnumero

TELEFONADO PER STRATAJ MONERAJ APARATOJ

Loka telefonado: Oni povas telefoni per ĉiuj moneraj aparatoj en la publikaj niĝoj, enjantante 5,- Ft-an moneron.

Tarifoj de la loka telefonado: inter 07-18 horoj 5,- Ft/3 minutoj; inter 18-07 horoj 5,- Ft/6 minutoj

Enlanda kaj interacia telefonado: Oni povas telefoni enlanda kaj interacie el la moneraj publikaj telefonoj, signalaj aparte, enjantante 5, 10 aŭ 20 Ft-an moneron.



Esperanto en la telefonlibro!

La ĉi-jara telefon-libro (registra libro kun nomo, adreso, telefon- kaj telefaksnumero) de budapeŝtaj abonantoj enhavas ĝeneralajn informojn pri la telefon-uzo en Hungario en la angla, germana, franca, rusa kaj ankaŭ esperanta lingvoj! (Ĉu tio signifas, ke la poŝto konsideras tiujn la plej gravaj lingvoj?) La telefonlibro havas 1584 paĝojn, la esperantlingvaj klarigoj troveblas sur la p. 30.

La telefona sistemo, la internaj diversaj tonoj, ktp. varias de lando al lando, do por eks-terlandanoj fakte povas esti utilaj la koncernaj klarigoj.

Por ke la esperanta teksto ne estu nur unu-jara eksperimento, estas necesaj reagoj, dank-esprimoj kaj eventualaj laŭdoj, direktitaj al la marketinga direktoro de la telefona kompanio:

Magyar Telefonkönyv-kiadó Társaság, H-1506 Budapest, Pk. 86.

Ĉiu bird' erektas paron...

Forumo

La suba artikolo aperis en Forumo, (gazeta) organo de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj (LSG). Por komencantoj: geĵ neologisme signifas samseksama sed kiel mallongigo GEĴ ankaŭ signifas Germana Esperanto-Junularo.

La nomo de GEĴ ja belas ĉu ne? Antaŭ kelkaj jaroj estis periodo kiam alvenis sufiĉe multaj de geĵoj, kiuj pensis, ke GEĴ povus helpi al ili. Ĉu eble estis nur preteksto por ekirilati kun la bela redaktoro de GEĴ-gazeto?

Nu, kiel freŝa burĝoniĝinto mi havas la ag-rablan taskon rakonti pri tio, kion vi mal-trafi...s. Unue, kompreneble, la belajn virojn. Due, la interesajn prelegojn de Helmut kaj mi. En Kubo ni jam ege scivolis, kiu venus al anoncita kaŝa loko por ekinformiĝi pri LSG. Bedaŭrinde venis neniu (eble la loko estis tro kaŝa). Pro tio mi proponis, ke oni faru prelegon al kiu ankoraŭneuloj povu veni, sed pro multaj intersiĝantoj ni ŝanĝis la tempon.

Mi supozis, ke ne tro multaj homoj interesiĝas pri *Samseksamo ĉu malsano aŭ socia konflikto* kaj *Coming Out (burĝoniĝo) ekvivo de geĵeco*. Mi elektis gemutan ĉambron en la dua etaĝo. Kiam ni alvenis, jam estis trideko da homoj en la ĉambro, inter kiuj belaj knaboj, amikoj miaj, kiuj nun eksciis pri mi! Mi estis iom nervoza sed ne plu estis malfareble. Helmut komencis prelegi pri la sociologiaj aspektoj de geĵeco kaj ankoraŭ envenis homoj, ĝis kiam estis pli ol 40. Kelkaj eĉ devis stari. Cetere, de tiu kvardeko vi povas subtrahi dekon da scivolos virinoj. Nu, post dudek minutoj venis mia vico. Mi iom balbute komencis duone laŭtlegi mian preparitan tekston, duone libervole klarigi la paŝojn, kiujn preskaŭ ĉiu geĵo trairas antaŭ definitiva burĝoniĝo. Mi menciis ankaŭ ke multaj homoj ne

sukcesas eĉ ekvivi sian geĵecon. Kelkaj eĉ memmortigas sin pro la socia premo. Pensante ke eble estus burĝoniĝontoj en la publiko, mi faris ĉapitron: "Kion vi povas fari, se vi sentas vin geĵa?"

Post la prelego oni demandis min, ĉu mi ĉion mem spertis. Mi estis preninta la plej multajn ideojn el la libro *Geĵa, nu kio?* de Thomas Grossmann, ĉar mi ne intencis rakonti mian tutan vivon al la homoj. Tamen estis homo, kiu demandis: Nu bone, ĉu iu alia geĵo ŝatus rakonti sian burĝoniĝon al ni? Thomas savis la iom embarasan situacion majstre, rakontante ke lia unua viro estis esperantisto. Post tio ni diskutis pri la geĵ-edziĝo. Precipe iuj nederlandanoj (ĉu negeĵaj?) estis ege por.

Fakte la tuta renkontiĝo estis vere amuza. Mi nombris naŭ malkaŝajn geĵojn inter la partoprenantoj. Tio estas relative malmulte (2,3% el 380 partoprenantoj), sed ja estas grupo. Kaj ni tre ĝojis pri la renkontiĝo. Kisoj en publiko estis nenia problemo. Mi vere ŝatas la sintenon de esperantistoj. Tamen mi miras, ke en Esperantujo ne estas pli da geĵoj ol en la ordinara socio? Oni provas foje iel fuĝi aŭ distriĝi. Fakte en Esperantujo oni ja trovas multajn strangulojn.

Nu bone, el tiu tridek aŭskultintoj de niaj prelegoj bedaŭrinde neniu balu' poste petis pli praktikajn informojn...



Praktikaj informoj pri LSG kaj ĝia bulteno FORUMO

Ŝajnas, ke FORUMO bone plenumas sian rolon en sia rondo. Krom prigejaj artikoloj aperas ankaŭ etaj novaĵoj, kaj tre grave funkcias kiel konkreta peranto inter siaj membroj, kode anoncitaj privataj renkontiĝo-ofertoj (en la 64-a n-ro 53 da tiuj tra la tuta mondo). Intersiĝantoj (ŝajne nur membroj) povas peti informojn pri ili pere de la sekretario laŭeble kun respondkuponon:

Peter A.Danning, 68 Church Road, Richmond (Sy), Britio TW10 6LN

La bulteno FORUMO redaktas:

La Pigeto, Marco Gazzetta, c/o Becker, Chr-Schult-Str.16 D-W-5000 Köln 30, Germanio

Ni nur scias pri la ekzisto (sed ne pri la enhavo) de la subaj du bultenoj:

La Burĝoniĝilo, novaĵletero por geĵa esperantularo de Norda Ameriko kaj de ĝia monda amikaro. Redaktas: E. Galvin, 2440 Market Apt.6, San Francisco, California 94114, USA.

La Bugradilo haveblas ĉe: Geĵa Libereco, Pf. 399, LN-3740 Baarn, Nederlando.

Movado

UEA-seminario pri Informado, Poprad, 29.02-02.03.1992

Kunvenis por semajnfino kvindek de aktivuloj-funkciuloj el dek ses landoj por kune pridiskuti rilaton kun la ekstera mondo, precipe pri amaskomunikiloj.

Kiel kutime, se kunvenas diverslandaj movadaj kunlaborantoj, signifa tempo estis dediĉita ankaŭ al multaj duflankaj diskutoj, kunlaborprojektoj, transpagaj problemoj, ktp.

Rimarkindaj estis kelkaj prelegoj de Stefan Maul, Lu Wunsch-Rolshoven, Ivo Durwael, Reiner Heckhausen, Stefan MacGill, kun kiu lasta oni modelis organizajn teamojn de imagita Loka Kongresa Komitato en imagita lando (Mezeŭrio). Kaj tie, kaj post aliaj prelegoj oni kolektis multajn ideojn, indajn celarojn. Kelkfoje venis konkludoj, kelkfoje ne, pro hasto por ŝangi la temon aŭ pro babliemo pri flankaj temoj. Ĉiu profitis, kion notis por si mem.

Fakte kelkfoje sentebelis ia abismo de la aŭskultantoj kaj la preleganto, kiu audacis uzi tre fakajn vortojn pri socia merkato Reiner Heckhausen, ekzemple. Feliĉe kelkaj de tiuj prelegoj estas haveblaj skribe, kaj tiel pli digesteblaj ankaŭ por la neĉeestantoj. Vidu tiun de Stefan Maul sur p. (2) Aliaj ankaŭ sekvas.

Ĉetere ĉiukaze mi opinias, ke semajnfino ne sufiĉe longas por fari profundaj prelegojn, nure la antaŭe senditajn post hejma legado surloke kompletigi, diskuti. En la sekvontaj fojoj, ĉiukaze daŭrigendaj, eble oni sukcesos atingi pli altajn pintojn.

s.H.



Movada lernejo

propedeutika valoro de esperanto: lernado de esperanto plifaciligas la lernadon de aliaj lingvoj, pruvita per eksperimentoj, ofte menciata argumento por provi enkonduki esperanton ankaŭ en tute "malamikaj" por esperanto medioj.

krokodilo: tiu, kiu ne uzas la komunan lingvon komprenatan de ĉiu ĉeestanto (se ekzistas), sed iun alian, kiun ne ĉiu komprenas. Tia ago estas malgentila. En Esperantujo: kiu ne parolas esperanton inter esperantistoj.

Malferrmita letero al la Esperanto-kursgvidantoj

Kial instrui esperanton?

En artikolo titolita „Fremdlingvoj: la ega seniluziigo” (*Famille Magazine*, Paris, majo 1991), ĝenerala inspektisto pri fremdlingvoj, skribas i.a. ke por lerni fremdlingvon studento bezonas motivegon, senĉesan kontakton kun la lingvo kaj plurajn restaĵojn en la koncernata lando. Alia inspektisto pri fremdlingvoj kutime diris, ke tiurilate lernanto bezonas trionon da inteligenteco, trionon da motivo kaj trionon da laboro, sed ke tiu-ĉi dependas de la motivo. Sekve gravega punkto, ankaŭ por lerni esperanton, estas la motivo! Pro tio, niaj esperanto-kursgvidantoj regule demandu sin pri la celado de sia kurso. Neniel estu por plezurigi sin mem, sed por renkonti kaj sproni la motivojn de siaj lernantoj.

Precipe en kursoj organizitaj de la esperanto-grupoj, ŝajnas ke tro ofte la ununura celo estas varbi novajn anojn kaj esperantigi homojn laŭ la motivo de la kursgvidantoj... sen atenti tiujn, kiuj instigis la lernantojn aliĝi al la kurso. Gravega tasko de kluba esperanto-

instruanto estu bonege informi pri la individuaj motivoj kaj regule nutri ilin per trafaj sciigoj. En lernejoj kursoj, endus ke ILEI fonde esploru laŭnivelan celaron. Jen kelkaj sugestoj:

elementa lernejo

- riĉigo de la gepatra lingvo (radiko + afiksoj)
- rekono de gramatikaj elementoj (nomo, verbo, adjektivo, adverbo)
- flegado de la kreativeco, k.s.

mezgrada lernejo

- komparo kun aliaj lernataj (-otaj) lingvoj
- enkonduko al internacia pensado
- internacia korespondado, k.s.

universitata nivelo

- fakrilatoj kun alilandaj samfakuloj (i.a. sine de AIS — Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino)
- sciencaj esploroj pri la lingvo
- instruado de esperanto, k.s.

Ne sufiĉas veki intereson pri la Internacia Lingvo per trafa informado, nepras ankaŭ dece instrui kaj utile aplikadi ĝin.

Nova laborkomisiono en ILEI

Fine de februaro fondiĝis en Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj internacia laborkomisiono pri lernejoj konkursoj.

La celo de la laborkomisiono estas ebligi jam en la komenco praktikan uzon de esperanto. Konkursoj liveras por tio aparte tikan okazon: junuloj volonte intermezuras ja siajn kapablojn. Kaj ĉar multaj tradiciaj formoj (turismo, korespondado, kampado, ktp.) lamas lastatempe pro diversaj, ĉefe financaj kaŭzoj, sekve malkreskis la nombro de eblecoj praktike profiti el la lingvokono. Konstantaj kaj porokazaj konkursoj povas animi la lernohorojn aŭ la eksterklasan aktivadon.

Unu el la konstantaj konkursoj jam sukcese funkcias en Hungario kun partopreno de pli ol 200 lernejoj, el porokazaj konkursoj fariĝis tradicio la Hungarlanda deklamkonkurso, kaj lastaŭtune la unuan fojon estis okazigita tut-

landa konkurso pri arta traduko. La eblecoj estas multe pli vastaj.

Ni bezonas entuziasmajn pedagogojn el ĉiuj landoj, homojn, kiuj estas pretaj gvidi aŭ kunlabori en ĉi tiuj aŭ similaj aktivigaj konkursoj. Se vi povas kontribui, skribi, aliĝi!

En unueco estas forto! De via helpo ankaŭ dependas la sukceso. Skribu al:

s-ro Géza KURUCZ, Hüel u. 10, fsz. 16,
H-6000 Kecskemét, Hungario

Internacia Konkurso por lernejoj

Ekde septembro ni planas publikigi la taskfoliojn de la konkurso (menciita en la n-ro marto(2)-92), kiu de jaroj sukcese disvastiĝis en lernejoj. Baldaŭ aperos ĝia regularo. Instruistoj, studinte ĝin aligu viajn lertajn disĉiplojn al la konkurso.

Géza KURUCZ

Geert Dedapper, Belgio

Internacia Skolta Tendaro en suda Pollando

(02-11.07.1991)

Dum la someraj ferioj okazis la unua internacia skolta esperanto-tendaro: SKOLTO'91. La 43 partoprenantoj el kvin diversaj landoj (Ĉeĥoslovakio, Pollando, Finnlando, Germanio kaj Belgio) travivis dek neforgeseblajn tagojn en tereno meze de la arbaroj de la Beskid-y-montaro. Oni ne povus esti elektinta pli bonan ejon. Estis mirige vidi tian grandan naturejon, kie ne ĉiu loko, kiu valoras iomete la penon, eluziĝas de turistoj kaj kie ne post ĉiu montopinto atendendas vojo.

Malgraŭ la tradicia nomo *tendaro* ni ne loĝis en tendoj, sed en lignaj dometoj. La sola tendo estis iaspeca saŭno (kelkaj tuboj kaj ligna fajro), kiun la finnoj kunportis.

Lingva nivelo: estis bedaŭrinde, ke komence nur la duono de la partoprenantoj povis glate esprimi sin en Esperanto. Tial estis organizitaj kursoj, tiel ke je la fino de la tendaro jam granda parto posedis sufiĉan scion por iomete solvi la lingvajn problemojn. La programo estis sufiĉe plena. Unue estis la ordinara skolta aktivecoj: serĉpromenado, kvizo inter la diversaj nacioj por testi ilian konon pri la aliaj landoj (konsterna fakto: neniu sukcesis nomi du konatajn personojn el mia ŝatata patrujo, Belgio), ekskurso al la montaro kaj al la proksimaj urboj Bielsko Biala, Ĉenstohovo, Krakovo kaj al la koncentrejo Auschwitz.

Komence min iomete ĝenis la etskaleco, sed mi spertis, ke ĝi estis pli avantaĝo ol malavantaĝo. Tiel eblis kontakti preskaŭ ĉiujn (almenaŭ se la lingvoj tion ebligis), kaj la etoso estis bona.

Dum la vojaĝo ni havis la okazon testi ankaŭ la funkciadon de Pasporta Servo. Kaj efektive: trifoje ni pasigis noktojn ĉe anoj, kaj

Arangoj

Ĉiujare estas dissendata en multaj ekzempleroj la programkajero de Monda Turismo. Sed ne ĉiuj tralegas ĝin zorge, ĉar kutime ĝi estas plena de amas-karavanaj buslinioj ne veturantaj al esperanto-renkontoj sed nur turisme, tial plejparte krokodile. Bone, ke ankaŭ tiaspeca apliko de esperanto floras, sed tial en ĝi nespertulo ne tuj orientiĝas.

Krome ĝi estas kutime presata per etaj kaj nelegeblaj koloraj literoj. Tamen jen, kelkaj interesaj ofertoj:

Internacia kurso de Eta Komercio
26.04-03.05.1992, Bydgoszcz, Pollando
Gvidos: William R. Harmon (Usono), vicestro de kalifornia ŝipkompanio.

Internacia kurso
"Kiel gvidi propran firmaon?"
03.05-10.05.1992, Bydgoszcz, Pollando
Gvidos: d-ro Werner Bormann (Germanio)

Internacia seminario pri la esperanto-gazetaro
24.05-31.05.1992, Bydgoszcz, Pollando
Gvidos: Ada Fighiera-Sikorska, redaktoro de Heroldo de Esperanto

Por ĉiuj tri supre menciitaj: partoprenkotizo estas 200 NLG pagenda al uca-konto "etur-p". Organizas: Esperantotur, str. M. Skodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando

Kotizo... oh!

Antaŭ nelonge (en n-ro 1) ni ĝojis pri partoprenkotizo de Latvia Internacia Printempo (30.04-05.05.92) kaj nun ni ekscias pri la detaloj: nur la aliĝkotizo estas 20 USD, malkiel aperis en Konkize nov.91. Eble ne la organizantoj, sed iu iam misis, kaŭzante miskomprenon.

Aliĝkotizo por *evoluintaj* landoj 20 USD, por ekssocialismaj 5 USD, por ekssovetianoj 25 SUR, por membroj de LEA 10 SUR.

Restadkostoj: en hotelo 600-2000 USD laŭ kategorioj, en studenthejmo 30 USD, por enlandanoj nur tranokto 400 SUR.

Ejo: kongrescentro de la Latvia Akademio en ferurbo Jarmata, temo: lingvopolitiko de reform-eŭropo, prelego pri la puĉaj tagoj en Latvio.

Kanto- kaj deklamkonkurso "Printempaj sonoj". La konkurso havos 6 branĉojn: popolkantoj, romanoj, originalaj kantoj en propra plenumo, kantoj de nuntempaj komponistoj, klasika kaj opera muziko, kaj la ceteraj. La juriajn taskojn plenumos la publiko.

Bedaŭrinde mankas informoj por eventuala karavano aŭ certa rezerveblo de loko en trajno reen. Por multaj ne la kotizo limigas la partoprenemon, sed la kondiĉoj atingi, kaj ĝustatempe reveni.

Organizas: LEA, a/k 150, 226050 Riga-50 Latvio, Tel: Mara Timermane: (0132)361395 kaj Biruta Rozenfelde (0132)383461.

4-a Alp-Adria Konferenco

30.04-03.05.1992, Poprad, Ĉeĥo-Slovakio

Regiona renkontiĝo de alp-adri-landaj esperantistoj, ne nur por aktivuloj. Ne gravas, ke Poprad estas en montaro Tatro, kaj ĝi estas nek Alpoj, nek Adria regiono. Ĝuste tio estas la temo de la lastatempe ofte ŝanĝiganta mondo, regionaj kunlaborebloj: evoluigo de la esperanta agado en centreŭropa areo post la reĝistigo de la geografia situacio.

Partoprenkotizo: 15-18 DEM/tago (trifoja mango + tranokto), tuttaga bus-ekskurso 8.5 DEM.

Esperanto-Centro, Sobotské Nám. 6. CS-058 01 Poprad, Ĉeĥo-Slovakio.

Muzika Esperanto-Ligo (MEL)
pasintsomere okazigis la 4-an Internacian Seminarion pri la temo *Paralela lingva kaj muzika instruado*, en bulgara montodomo *Baĉo Kiro*. Gvidis la kunvenon Prof. Dimitar Terziev.

Estas planata ankaŭ en 1992 dusemajna seminario. Pri konkretaĵoj informas: Muzika Esperanto-Ligo, Milin Kanak 58, BG-1421 Sofio, Bulgario.

Mondkongreso de Esperantistaj Handikapuloj

18-25.07.1992 Františkovy Lázně
Pliaj informoj ĉe: Asocio de Esperantistoj-Handikapuloj, P.k. 63, CS-27480 Slany, Ĉeĥo-Slovakio.


DESPERANTISTO



trifoj ne kore akceptiĝis. Du gastigantoj montris al ni la regionon, kaj pro tempomanko ni devis malakcepti la proponon de la tria, viziti kun ni sian urbon.

Pro la sukceso estiĝis planoj organizi pli tendaron la sekvontan jaron, komence de aŭgusto, kiel parton de pli granda internacia skolta kunveno en Germanio kaj/aŭ aparte en Ĉeĥoslovakio.

(laŭ Konkize 5/91)



Por mi ne estas klare, ĉu al tiaspeca partopreno oni nepre devas esti skolto. Kial tio estas grava? Ĉar laŭ la priskribitaj okazaĵoj tiu povus interesi ĉiuspecajn junularajn-infanajn grupojn, kiuj ŝatas kunteŝtumi, ekskursi, kanti, amikiĝi, ktp. Mi ne trovis indikojn pri eventualaj specialaj ritoj, nepre postulata kondutmaniero (vestaĵo, saluto, tagordo) aŭ aparta mondkoncepto, kiu laŭ mia scio ankaŭ en la skolta mondo ne estas tute unueca (ekz. rilato al religio). Espereble SEL bonvenigus ĉiujn kunteŝtum-dezirantajn grupojn, pri eventualaj pliaj kondiĉoj kontaktu SEL. Mi ankaŭ volonte legus ĉi gazete pli da detaloj de la koncernuloj. La lingva nivelo tamen devus esti multe pli bona jam komence de la tendaro!

Adreso de Skolta Esperanto-Ligo: p/a David H. Withey, 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool, L22 3YE, Britio. Komencantoj ne forŝirmiĝu, ankoraŭ estas tempo, fariĝu celo de la lingvolernado baldaŭtaj tendaroj, amikiĝu kun alilandanoj!

Intercamp en Montabaur

La granda ne-esperantista skolta tendaro Intercamp okazos 05-07. de junio (je Pentekosto) en Montabaur, Germanio. Oni atendas 3000 geskoltojn el Eŭropo, Usono kaj Kanado. Interesiĝantoj por organizi esperanto-informstandon tie skribu al Arie Bourman, adreso sube.

Internacia Skolta Tendaro (SKOLTO '92)

01.08-10.08.1992 Kremnica, Ĉeĥo-Slovakio
Kremnica estas montara urbeto, iam fama pri orminejo, monfarejo. La tendarloko estos apud la urbo en turisma centro. Kuireja kaj sanitara bazo estos en lignaj domoj. Ĉio alia en grandaj soldataj tendoj.

Kutimaj skoltaj programoj, tendarfajro, spurado, sportado kaj kantado. Okazos ankaŭ esperanto-kurso por komencantoj kaj progresantoj, sed atendataj estas unuavice jam komencintoj, 14-18 aĝaj.

Partoprenkotizoj:
Ĝis 01.05.92 por landoj A(okcidentaj) 4700 BEF, por landoj B(eksoclandoj, triamondo) 1630 KCS. Poste ĉiumonate + 100 BEF aŭ 60 KCS. Nepagipovanoj povas peti rabaton. La kotizon sendu al belga poŝtĉekkonto 000-1622668-52. Ĉefa organizanto: Arie BOUMAN, Driesdreef 8, B-9030 Gent, Belgio. Tel efono + telefakso: 32/91/274841.

Lokaj perantoj: Jana Nesporova, Tajomskoho 32/42, CS-96501 Ziar n/Hronom, Ĉeĥo-Slovakio.

kaj Georgo Handzlik, ul. Braterska 41, PL-43-346 Bielsko-Biala, Pollando.

(daŭrigo de paĝo 1.) SENILUZIIGOJ KAJ ESPEROJ

kam kelkaj membroj de TEJO (*ĉu la estaro? La red.*) pensas la malon kaj diras, ke TEJO ne povas subteni ĉiun gazeton, kiu povas interesi junulojn. Mi esperis, ke TEJO estas junulara organizo... Cetere, EŬROKKA fariĝis faka asocio de TEJO.

Tamen ekzistas esceptoj, kaj indas, ke ni daŭrigu por ili, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj. Pro tio ni dankas ĉiujn niajn abonantojn, la esperanto-muzikgrupojn, kiuj glatigis la aferon por ĉi tiu numero.

La esperanto-kulturo pli kaj pli riĉiĝas. Novaĵoj pri *Persone, Kajto, La Mevo, Amlifiki*, tutlaste *Tutmonda Muziko*, ktp. montras, ke ni povas sen timo ekvidi estontecon serene, almenaŭ tiurilate.

Ni povas vidi ankaŭ, ke pli kaj pli da esperanto-aranĝoj pretigas esperanto-kultur-programojn kun esperanto-rok-, pop- kaj folk-muzikgrupoj.

Kiel ekzemple niaj amikoj italaj, germanaj, katalunaj, parizaj, bordozaj. Ni kuraĝigas tiujn iniciatojn, ĉar tio vivigas nian lingvon kaj ĝian kulturon. Ni devus atingi la punkton, je kiu esperanto-aranĝo ne okazus sen esperanto-

kulturprogramo - hontindaj tiuj, kiuj provus aliel fari. Dungi esperanto-muzikgrupojn pliampleksigos ilian kvanton, diversecon kaj kvaliton. Organizu koncertojn, turneojn, festivalojn, ktp.

Pripensu la aferon, petu informojn de tiuj, kiuj jam havas sperton, funkciigu vian korespondemon per la esperanto-rokmuzikreto.

Konatigu ĉirkaŭ vi *Rokgazon*, abonigu ĝin se vi pensas, ke indas, fariĝu peranto en via lando. Petu de ni la kased-disk-distribuan katalogon de Vinilkosmo kaj konatigu la kasedojn kaj diskojn de ĉiuj esperanto-muzikgrupoj, tio veturigas esperanton pli ol kio ajn.

Ne imageblas, ke ĉiu esperantisto ne havu en sia diskoteko ĉiujn novaperintajn esperanto-rok-, pop-, folk-muzikproduktaĵojn. Kiel sen tio ili povus varbi por esperanto? Ne penseble, ĉu ne? Reagu kaj roku

Flo
(el *Rokgazel' 3*)

La rok'gazon eldonas EŬROKKA,
eldon-direktoro Floreal Martorell,
F-31450 Donneville, Francio

Internacia Junulara Semajno, IJS-91

Postuli esperantan rokmuzikon...

Dum la unua aŭgusta semajno okazis la Internacia Junulara Semajno en Esztergom (H), kiu de kelkaj jaroj iĝas alternativa junular-aranĝo por tiuj, kiuj ne povas iri al la Internacia Junulara Kongreso de TEJO.

Pri la programo, vetero, Danub-inundo, ktp., vi certe legos en la normala talp gazetaro. Bonaj artikoloj aperis en GEJ-gazeto, Koncize kaj sendube aliloke. Mi ŝatus insisteti je nur unu punkto: la bonege funkcia trinkejo, kiu restis malfermita ĝis malfrunkto (aŭ frumatene, laŭvidpunkte), kaj kie ni povis kostete akiri gustegajn trinkaĵojn kaj manĝetaĵojn. Mi tie pasigis plej plej agrablajn horojn, babilante kun amikoj novaj kaj malnovaj kaj pri la programeroj... bedaŭrinde, Klementin?

Estis multe da muziko plejparte malroka. Popolkantoj kaj -dancoj de Litovio, kanzonoj de Katalunio, ktp. Tre bele. Mi ĉeestis nur unufoje, ĉar la ejo estis multe pli malgranda por tia spektaklo, kaj restis apenaŭ eĉ starloko.

Ne okazis rokkoncerto. Nu, ja plurajn vesperojn oni organizis diskotekon, sed tio ne estas vivanta muziko. Nur unu vesperon ni havis vivantan rokmuzikon, dum la balo. Temas pri tre talenta hungara bando, tute adekvata por dancvespero. Iia repertuaro iom datis rokenrolo de la sesdekaj jaroj. *Beach Boys*, kaj kompani'. Kaj en tre bona usonangla:

Nu, mi ne estas talpo, kaj mi bone scias, ke ne ĉiuj homoj sur la Tero parolas esperanton. Sed ŝajnas al mi, ke la ĉeestantoj de junular-aranĝo rajtas postuli junularmuzikon je modernan rokon, kia ajn ĝi estas! Kaj en esperant-aranĝo, ili rajtas postuli almenaŭ unu esperantan rokkoncerton.

RoKo
(laŭ *Rok-gazel' n-ro 3*)



La postulo estas justa. Kie alie prezentiĝu portantoj de la esperanta kulturo, se ne antaŭ esperanta publiko? Kaj rok-koncerto estas io alia ol ekzemple literaturo, ĝi bezonas spektantojn same kiel teatraĵo. Ĝi la partoprenantoj de junulara esperanta(!) renkonto? Ĉu ne tio devus esti unu el la plej grandaj allogaĵoj de esperanta renkonto, mem sperti esperantlingvan kulturon, ne nur en konserva formo hejme?

Kial do ne estas esperanta rokkoncerto? Ĉar ĝi estas multekosta, pli kosta ol loka bando, almenaŭ pro la transport-kostoj de la muzikiloj. Kelkfoje tion tamen eblas aranĝi, tial la reĥoj, "postuloj" estas utilaj por la organizantoj por klopodi meti ĝin en la buĝeton, serĉi vojojn, ekzemple subvenciojn de kulturaj instancoj, marĉandi kun muzikbandoj. Plialtigi kotizon de partoprenantoj ankaŭ eblas, sed tio estas parto de la organiza taktiko. Eble entute venus malpli da mono ĉar aliĝus malmultaj. La vivo estas maljusta. Jam eĉ nun por multoj la kotizo (kun vojaĝkostoj, ktp) ne estas pagebla.

Muzikistoj ankaŭ estas interesitaj serĉi subvenciojn kaj malaltigi siajn kostojn, alie ili ne povas prezentiĝi. Sed kutime mankas profesiaj manaĝeroj en Esperantujo por prizorgi tion, kaj tial la tuta afero estas nur hazarda, se oni havas energion.

ŝ.H.

Lingvo

Nomo-modo

Elektante nomon al novnaskito troveblas ne malmultaj, kiuj ankaŭ en esperanto havas signifon. En iuj landoj oni povas doni ajnan nomon, dum en aliaj nur iun el listo de registreblaj. En Hungario ekzemple tiu leĝo validas nur al ordinaraĵoj. Homoj kun nehungara nacieco rajtas je io ajn. Krome hungaroj kun speciala deziro ankaŭ estas akceptataj, se antaŭe tiucela komisiono esploris ĉu la dezirata nomo ne signifas ion ofendan, obscenan en ajna lingvo. Eble tial ne estus akceptata la ofta familia nomo *Fekete*.

Inter la tuj elekteleblaj ekzistas surprize multaj, kiuj havas signifon ankaŭ en esperanto. Ni vidu ĉiufoje kelkajn. Vi vidos kiel multaj ili estas. Jen la unuaj. (La divid-strekoj estas nur por pli bone kompreni ilin esperante).

Am-alia
Aŭ-gusta
Ge-orgia

kaj kelkaj viraj:

Te-odor
Virg-il
Er-vin

Vorto-modo

Ĉu ni diras kion ni volas? Ĉu ni uzas ĉiujn vortojn kiuj estas en niaj vortaroj, aŭ eble nur kelkajn modajn, dum aliaj kuŝas tie por jardenoj ĝis iu ekmodigas ilin. Jen ni kontribuu al tio, publikigante laŭvice kelkajn ne sufiĉe uzitajn kvankam meritajn vortojn. Ni volonte atendas ankaŭ viajn proponojn. Laŭeble ili ne estu ĵus elpensitaj neologismoj, nek tre fakaj vortoj, kaj troveblaj en Plena Ilustrita Vortaro.

lici esti malpermesite de la leĝo: *ĉu licas fumi en tiu ĉi kupeo?*

gruzo sablego el dikaj grajnoj, dispecigitaj ŝtonetoj. Ofte kovritaj per ili estas piediraj vojoj, *padoj* tra parkoj kun *flakoj*.

pado vojeto en kamparo, arbaro, ktp. apenaŭ konstruita, nur "farita", tretita de la irantoj.

flako malgranda kvanto da akvo aŭ alia likvaĵo, restanta en kavaĵo, sur vojo post pluvo.

trivi eluzi per frotado, uzkonsumi: *mantelo ĉe kubuto post longa uzado estas trivita*.

turnume tien kaj reen aĉeti bileton, veturi. Ankaŭ troveblas en vortaroj: *navete*, kiel naveto moviĝas. Naveto estas tekstmaŝina faden-gvidila peco moviĝante tien-reen.

dekstren-malen ambaŭdirekten fari ion, (rigardi aŭ svingi) kaj ne esti miskomprenata, (anstataŭ la neprononcebla dekstren-maldekstren).

dekstren-liven dekstren-maldekstren, neologisma propono nepre necesa ĉe aŭtostirado, navigado por ne esti miskomprenata tute danĝere.

Recenzoj



La dekdu noktoj de Satano.

Emiano Imby (K. Kalocsay). Svisio: Kooperativo de Literatura Foiro, 1990. 129p., 21cm. 49,8 NLG.

"Tiu ĉi libro estas naŭzige erotika kaj ofende blasfema", informas nin la antaŭprezento de Gaston Waringhien.

Nu, se vi ne kredas, ke erotiko estas naŭziga nek ofendiĝas pro blasfemo, vi povos legi la libron. Aliuloj estas avertitaj.

La verko dividiĝas je du partoj: dekdukanta poemo *La eksmonahino* kaj longa novelo *La dektria nokto*. Ili rakontas la amon - aŭ preferdire poseditecon - de viro je mistera virino, amo kiu kondukos lin ĝis morto. Kalocsay mirigas nin per sia brila versarto kaj elstara verktekniko. Sed tiu ĉi malfrua verko malpli tuŝas nin ol *La Libro de amo*, kvankam multo en ili similas stile kaj teme. Fakte, ŝajnas al mi, ke mankas ĉi tie la tenereco de la unua verko, per kiu amoro kaj amo estis ja pasiaj sed restis homaj.

Eble ne hazarde Kalocsay ne publikigis ĝin dum sia vivo, kaj lia vidvino kaŝis ĝin en tirkesto dum dek tri jaroj. Kaj unue mi havis impreson, ke temas pri adoleska seksobsedito por kiu virino estas nur amor-objekto, por kiu, laŭ propra diro, "...en la mondperplekso/ estas feliĉo sola: la ĝuo de la sekso...". Poste, mi rimarkis la etajn ekbrilojn de ironio kaj sinmoko kiuj savas ĉion. Kion mi unue interpretis sardona, mi poste komprenis burleska, do nur "erotikla". Ankaŭ en la novelo oni konstatastion: la lingvo esperanto mem fariĝas berveale grava parto de la rakonto.

Kaj ĉiuj, kiuj kongresis aŭ alimaniere partoprenis esperantistan vivon, ja scias, ke Esperanto mem estas afrodizia.

R. Cash
laŭ Esperanto, jul-aŭg.91

Anoncetoj

Poŝtigan feston organizas redakcio de Juna Amiko kvarfoje jare. Pri datoj informos la redaktoro la interesigantojn. Precipe Budapeŝtanoj anoncu sin ĉe: Stefan MacGill, Esó u. 7. III, H-1034 Budapest, Hungario

Kursojn pri laŭtona akordeono kaj tradiciaj dancoj (*randoo, mazurko, polka, bureo, skotiŝo, ktp*) organizas Jarar kaj Monik GARIG, Muelejo, F-09600 Limbrassac, Francio. Pri la dato kaj daŭro interkonsentu.

Internacia koresponda ludo *Monda Panoramo* proponas havi multaj poŝtkartojn. La regularo estas havebla kontraŭ du IRK-j ĉe: Agentejo Sortimento, Holló L. u. 61. V. H-6100 Kiskunfélegyháza, Hungario.

Literaturo

Zi vol lölik

Per la represo de la revuo "Zi vol lölik" (Ĉirkaŭ la mondo, 1888/89-1891/92) la grava fonto-dokumento, kies kompleton posedas ĉe nek unu biblioteko, rehavelos. Ĝi donas aŭtentan impreson pri kulturhistorie interesa movado kaj donas panoraman rigardon al la historio, literaturo kaj praktika utiligo de Volapük.

La nuna volumo apartenas al la planlingvaj rareĝaĵoj: ĝi prezentas trezorejon por ĉiuj interlingvistoj kaj esperantologoj.

La volumon prizorgas la eldonejo Georg Olms, la planata vendorezo estas 238 DEM. Pliaj informoj:

Eldonejo Olms,
Hagenorwall 7, DW-3200 Hildesheim,
Germanio.



Al niaj legantoj

- Se vi sendas materialon por *EVENTOJ*, bv. zorge koncizigi ĝin! Provu imiti la jam aperintajn artikolojn! Por diverskategoriaj aferoj (kiel eldonejoj, abonaj aferoj aŭ artikoloj) nepre uzu apartajn foliojn! Se vi sendas informojn telefakse, bv. uzi kiel eble nigrajn (!) kaj grandajn literojn, aŭ enŝalti la funkci-reĝimon de altkvalita malkompono.

- Responde al multaj demandoj: la novaj abonantoj kompreneble ricevas ankaŭ la ĝisnunajn numerojn - ĝis ilia elĉerpiĝo. Ne necesas peti ilin aparte, la forsendo okazas aŭtomate.

Ni fieras esti esperantistoj!

Kaj ĉu Vi?

Korespondi deziras

10 talentuloj en la 6-a klaso de publika lernejo, Biblioteko Abbott School, 2650 N. Orchard, Chicago, IL 60614, Usono.

14-jara knabino, kun geknaboj el Japanio aŭ Aŭstralio, Edit URBÁN, Arany János u. 48, H-3711 Szirmabesenyő, Hungario.

14-jara knabino, kun knabo el Francio aŭ Germanio, Mónika MÁZIK, József Attila u. 28, H-3711 Szirmabesenyő, Hungario.

13-jara pola knabo, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn, Jakub JAWNY, ul. Sonecznia 5, PL-57-540 Ladek-Zdrój, Pollando.

13-jara hungara knabino, interesiĝas pri lingvoj, gimnastiko kaj vojaĝo, Alexandra TÓTH, Derék u. 106.p.1, H-4031 Debrecen, Hungario.

Pierre LOCHON, 1300 route de Callas, F-83490 Le Muy, Francio. 66-jara emerita fervojisto dez. kor. kun hungaroj pri ĉi.

Sándor VÉR, 35 jara maŝinteknikisto dez. kor. kun eksterlandanoj, ĉefe el Kanado, Nederlando, Svedio kaj Finnlando. Volonte respondas ankaŭ al komencantoj.

Mallonge

Mongolio: eldonejo Ĉandmanj pretigas lernolibron kaj vortaron de esperanto por mongoloj helpe de UEA-fondaĵo "Saliko", por eldoni lernilojn en novaj lingvoj. Estas planata organizi kursojn, eldoni mongolan literaturon en esperanto kaj trimonatan revuon "Eterna Cielo". Jara abono: 3 USD. Konto: Ulanbatara banko, 151005. Adreso: Ĉandmanj, Pk. 21-797, Ulan-Bator, Mongolio.

Movimento per la vita (Movado por la vivo) en Savigliano, Italio enmetas en sian konkurson *Literatura premio L. Kolbe* ankaŭ esperanton. Informoj ĉe: Premio Nazionale di Poezia L. Kolbe, Via Tapparelli 15/A, I-12038 Savigliano, Italio.

Gvidlibro pri muzik-terminoj estas ellaborata. Estas petataj proponoj de inkluzivotaj terminoj en formo de citaĵoj. Andreo Marschall, 42 High St., Waltham, Grimsby, S. Humb. DN37 OPL, Britio.

La societo *Infanoj ĉirkaŭ la mondo* per helpo de stipendio de la eduka fondaĵo "Carson" produktis kasedon de 12 konversaciaj kantetoj por komencantoj, kaj per reklamoj proponis ĝin kaj numeron de "La Revuo" senpage al ĉiuj, kiuj instruas esperanton al infanoj. Jam estas senditaj pli ol 250 kasedoj kaj la revuo al 45 landoj. Multaj ricevintoj entuziasmiĝis kaj volas kunlabori.

Krom la fama Bonn-a oficejo GEJ havas oficejon ankaŭ en Berlin: Unter der Linden 38, DO-1086 Berlin, Germanio. Telefono: +37-2-20340564, telefakso: +37-2-20340543.

"Salutojn el La Chaux-de-Fonds..." Aperis grandformate (60x42 cm) la alloga kaj multkolora nova programo por 1992 de Kultura Centro Esperantista. 17 arangoj dum la somero, aliaj programeroj dum la tuta jaro. La elekto estas via! Adreso de KCE: Pf. 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Estas kompilita 26-paĝa adresaro de esperantlingvaj paroj kaj familioj en pli ol 30 landoj. La liston prizorgis R. Corsetti kaj A. Lowenstein, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

laŭ la buleno "Mallonge" (Francio)

EVENTOJ, esperantó nyelvű információs lap.
Nyt, sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:
1675 Budapest, pf. 87. Tel: 1288258.

Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELIR.
Készült az M & M nyomdában.
H-1161 Budapest, Becsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio
kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.
Teknike redaktas Sándor Hideg.

La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondacas pri la anonc-enhavoj.

Fervojaj rabatoj en Germanio

Plenpreze unuope kaj unudirekte trajnvojaĝi en Germanio multekostas, nome 0.24 DEM/km en antaŭa okcidenta Germanio kaj 0.14 DEM/km en la eksa orienta Germanio. Sed jam ĉiu plia persono, kiu vojaĝas tien kaj reen ricevas rabaton (ekde 200 km kunvojaĝantoj pagas nur la duonon). Troviĝas ĝangalo da komplik-kondiĉaj rabatoj. Ni vidu kelkajn interesajn.

Le sekvaj prezoj validas por la okcidenta parto de Germanio, sed ankaŭ inkluzivas la teritorion de orienta Germanio, se oni almenaŭ parte vojaĝas en la okcidenta parto. Verŝajne en 1993 la du fervojoj unuiĝos.

ICE (*Inter-City-Express*) estas nova rapid-trajno vojaĝante 250 km hore. Por ĝi validas specialaj prezoj. Sed ankaŭ la normala IC (*Inter-City*) veturas je 200 km hore, kie la trako permesas tion. Vojaĝante longdistance preskaŭ ne eblas ne uzi ĝin, sed ĝi nur kostas 6 DEM da krompago (aĉetante en IC-trajno 7 DM). Tia krompago plu validas ankaŭ post interrompo de vojaĝo. ICE-prezoj inkluzivas IC-krompagon. Ekde la 31-a de majo 1992 estos malfacile eviti la uzon de ICE ĉar aliaj trajnoj veturos nur kelfoje tage.


Ĉiuj nun sekvantaj prezoj estas por duaklasaj biletoj, unuaklasaj haveblas (krom *Tramper-Monats-Ticket*) kontraŭ la 1.5-obla prezo.

Biletoj ligitaj la unu persono:

La rabatbiletoj por sub-26-jaruloj donas en Germanio (nur!) ĉ. 20 % da rabato.

Por studentoj sub 27-jaraj (nestudentoj sub 23-jaraj), kiuj volas tre multe vojaĝi, monata bileto por Germanio estas interesa. La *Tramper-Monats-Ticket* inkluzivas IC-krompagon kaj eĉ biciklotransporton (nur en trajnoj kun pakajvagono). Necesas foto. Nur vendiĝas ĉe biletgicetoj en Germanio ne en trajno, ne ekster Germanio. Teorie necesas (laŭ duonsekretoj kondiĉoj) germana studenta legitimilo, sed almenaŭ en vojaĝantejoj sufiĉas internacia. La bileto kostas por okcidenta Germanio 300 DEM kaj vendiĝas ankaŭ kun orienta Germanio (+35 DEM), kun ICE (+100 DEM) kaj kun ambaŭ (+135 DEM). Atentu, ke vojaĝi eĉ mallongan distancon en la ICE necesas krompagi la 100 DEM, ĉar tia bileto alikaze tute ne validas en la ICE kaj tial ne eblas pagi la pli etan prezferencon.

Por loĝantoj ekster Germanio ekzistas *German Rail Pass*. Eblas aĉeti ĝin nur ekster Germanio (ne nepre en via hejmlando!). Aĉetante ĝin oni indikas monatan daŭron (ne nepre kalendaran), dum kiu eblas elekti 5, 10 aŭ 15 tagojn da senlima veturado en tuta Germanio inkluzive ICE kaj IC. Tia veturtago komenciĝas je la 23-a horo la tagon antaŭe kaj finiĝas je la 3.00-a horo la tagon poste. La biletkosto estas alta, sed komparu, ke monata bileto por tuta Germanio (ankaŭ aĉetebla por germanoj) kostas 1240 DEM, kaj oni ne uzas ĝin ĉiutage.



La prezoj (en DEM) laŭ la validodaŭro komparante la diverslongajn biletojn.

tagoj dum unu monato	5	10	15
prezo:	ĉ.336	ĉ.504	630
prezo po tago:	67	50	42
prezo po aldona vojaĝtago	-	+34	+29

Eŭro-Domino estas eŭropa sistemo valida en 20 eŭropaj landoj.

Oni aĉetas por unu aŭ pluraj landoj bileto(j)n kun po 1-monata validodaŭro. Poste (dum la vojaĝo) eblas elekti 5 tagojn da senlima veturado po ĉiu aĉetita lando. La bileto devas esti aĉetata en la loĝlando de la vojaĝanto, kaj nur por aliaj landoj. La kondiĉoj estas nun ŝanĝigantaj, informiĝu!

La prezoj varias laŭ sezono. En 1991 dum la ĉefa sezono (somere) Grekio kostis 32 DEM, Luksemburĝio 34 DEM, Germanio 220 DEM kaj Britio 360 DEM.

Biletoj NE ligitaj al personoj

Nun sekvas ĉefe longdistance aŭ/kaj kelkpersone indaj biletoj por tiuj, kiuj ĉefe volas vojaĝi *al*, kaj *de* unu renkontiĝo, eble per etaj kromvojoj viziti geamikojn survoje, sed ne ĉiudirekte multege vojaĝi.

Ĉiuj nun sekvantaj ankaŭ vendiĝas ĉe la germana biletkontrolisto en la trajno. Tio kromkostas 4 DEM, foje eĉ ne. La *Sparpreis* kaj *Super-Sparpreis*-biletoj vendiĝas ankaŭ en multaj landoj krom Germanio (certe en A, DK, NL, S)

Se 2 ĝis 5 homoj *kune al-* kaj *reveturas* per la *sama bileto*, tiam la 2-a ĝis la 5-a personoj ricevas rabaton. Ekde 200 km ili nur pagas po la duonon prezon kiel la unua. La IC-krompago (por *Inter-City* kaj *Eurocity*) ĉiu persono plene pagas (6 DEM, en IC-trajno 7 DM). Unu tagon antaŭe aĉetita IC-krompago inkluzivas sidloko-rezervon.

La biletoj estas (almenaŭ praktike) nepersonaj, do ne gravas se aliaj homoj revojaĝas ol alvojaĝis. Ankaŭ se ne ĉiuj revenas, aŭ veturas la tutan distancon, ofte indas komuna bileto.

La sekvaj ŝparbiletoj havas konstantan prezon por ajna distanco. Kromvojoj eblas, se ili estas "laŭ kutimaj vojaĝvojoj aŭ pro la horaro necesas". Tio nature estas gumparagrafo kaj kutime eblas facile konvinki la biletvendiston pri la dezirata vojo. Pefere aĉetu al la plej fora stacidomo antaŭ via ekveturpunkto kaj malantaŭ via celo eble poste vi volas uzi la reston.

Dum la validodaŭro ĉiaj interrompoj eblas. IC-krompagoj pluvalidas post interrompo. Sed atentu kiam la alvojaĝo devas esti finiĝinta.

Sparpreis (Spar-prezo)

Fiksita prezo por ajna distanco, indas ekde 438 km turnume (tien kaj reen). Por la 1-a persono 190 DEM (220 DEM kun ICE), por la 2-a ĝis 5-a personoj po 95 DEM (110 DEM kun ICE).

Kondiĉoj por *Sparpreis*: La alvojaĝo devas finiĝi ĝis 10.00-a horo de la lundo, kiu sekvas la unuan validotagon. La revojaĝon oni rajtas komenci plej frue je la 03.00-a horo en la sekvonta sabato. (Se la unua validotago estas sabato, oni rajtas tuj revojaĝi). La revojaĝo devas finiĝi dum unu monato.

Preztabelo ŝparprezo:

nombro da homoj	1	2	3	4	5
prezo entute sen ICE	190	285	380	475	570
prezo po homo sen ICE	190	143	127	119	114
po homo (inkl. 2 IC-kromp.)	202	155	139	131	126
prezo entute kun ICE	220	330	440	550	660
prezo po homo kun ICE	220	175	147	138	132

Super-Sparpreis (tre-ŝpar-prezo)

Fiksita prezo por ajna distanco, indas ekde 324 km turnume. Simile al *Sparpreis*, sed tute ne validas vendrede kaj dimanĉe.

1-a persono 140 DEM (180 DEM kun ICE). 2-a ĝis 5-a personoj po 70 DM (90 DEM kun ICE). Ofte jam por unudirekta vojaĝo (1-persone ekde 650 km) indas aĉeti ĝin, eĉ se ne uzi la reveturon. Tielmaniere ankaŭ preskaŭ ĉiuj kondiĉoj facile eviteblas. Ankaŭ indas se nur 1 persono vojaĝas tien kaj reen, la alia(j) nur unudirekte. Kaj eble estos kandidatoj por kune revojaĝi.

Kondiĉoj de *Super-Sparpreis*:

La bileto nek validas je vendredoj nek je dimanĉoj. La alvojaĝon oni devas fini ĝis la 10.00 horo en dimanĉo, kiu sekvas la unuan validotagon. La revojaĝo rajtas komenciĝi plej frue je la 03.00-a horo en la sekvonta sabato. (Se la unua validotago estas sabato, vi rajtas tuj revojaĝi). La revojaĝo devas esti finita dum unu monato.

Se la bileto estas aĉetita en Germanio, ĝi krome NE validas dum kelkaj festotagoj kiel kristnasko kaj pasko. Ekstergermanie aĉetitaj validas ankaŭ tiam, sed (eble pro tio) ili iom pli kostas.

Vojaĝeblecoj per *Super-Sparpreis*

preztabelo *Super-Sparpreis*

nombro da homoj	1	2	3	4	5
prezo entute sen ICE	140	210	280	350	420
prezo po homo sen ICE	140	105	93	88	84
po homo (inkl. 2 IC-kromp.)	152	117	105	98	96
prezo entute kun ICE	180	270	360	450	540
prezo po homo kun ICE	180	135	120	113	108

Zorge obeu la kondiĉojn, ĉar la kontrolisto alikaze enksigis la plenan prezon! Ne miru, se vi ne komprenis ĉion tuj, oficistoj ĉe la biletgicetoj ankaŭ ofte ne scias. Tiam vi sciu pli bone kaj insistu!

Bonan vojaĝon deziras (kaj plu klarigas se vi ne kompenas ion):

Andi Münchow, Oberstr. 15, D-W-3000 Hannover 1, Germanio. (Tel: 49(511)703689, inter 10-24-a horoj, aŭ 46(8)7957987 inter 10-22-a horoj.